

## RECENZO

Umberto ECO

## La SERĈADO pri la PERFEKTA LINGVO.

Titolo de la itala eldono:

"La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea."

Laterza, Rom-Bari (I), 1993.

"DIE SUCHE NACH DER VOLLKOMMENEN SPRACHE"

Verlag C. H. Beck, München (D), 1994

ISBN 3-406-37888-9 (388 p., 48.- DEM).

(Paĝnumeroj rilatas al tiu germanlingva eldono).

La nomo Eco estas, ekde apero de la libro, en la buŝo de ĉies adepto de la lingvo esperanto ne pro la fakto de ĉerkado pri la perfekta lingvo, sed pro la evento, ke mondfama aŭtoro sin dediĉas sur 9 de entute 388 paĝoj al la ekzistanta internacia helplingvo (IHL) Esperanto.

Tiu ago estas taksita kiel kuraĝa engaĝo de internacie agnoskita aŭtoro kaj semiotikisto por Esperanto en mondo de ne-agnoskpretaj politikistoj, ekonomistoj kaj teknikaj manaĝeroj. El la libro parolas simpatio por Esperanto kiel propono pri sufiĉe koherenta helplingvo. La mencio de Esperanto okazas, laŭ historia viceco, en la antaŭlasta el inter 17 ĉapitroj kvazaŭ kiel rezulto de aventura ekskurso tra la historio de lingvistikaj ambicioj eltrovi aŭ eble trovi la eblecon por universala, eĉ perfekta, lingva interkomprenilo.

Eco demandas sin, ĉu eblas trovi tian perfektan lingvon surbaze de la supozo, ke iu komuna lingvo iam perdiĝis - sed atentu la originalan titolon "*nella cultura europea*", kiu rilatas nur al Eŭropo.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

La libro cetere estas parto de la serio "Konstrui Eŭropon", el kiu jam aperis 7 volumoj, kaj aperos minimume ankoraŭ 8 volumoj, kaj esee de la eldonanto Jacques Le Goff kun la titolo "La malnova Eŭropo kaj la mondo de la moderna".

Eco prenas la ŝancon, komenci la temon ekzegeze je la tempoj de Adamo, kiam temis pri la nomigo de la aĵoj, kaj li demandas, ĉu la perdo de la Adama lingvo estas nur mito, aŭ ĉu la konfuziĝo de la lingvoj estas rezulto de natura evoluo (96). La lingva disiĝo komencis, laŭ la Biblio, jam antaŭ la "babela eksperimento", kaj la mito de la turkonstruado povas signifi simbolon de la frua homa megalomanio kaj ĝenerale de la homara malsukceso (347).

Sekvas ĉapitroj plenaj de semiotikaj pripensoj pri lingva kabalistiko surbaze de la hebrea. La ideo de iu sankta, sekreta lingvo ĉiam ludis gravan rolon en la utopioj pri monda kaj religia paco (87) laŭ principo de "natura" religio kiel ekz. la homaranismo (329), reprezentita en la esperantismo kiel "interna ideo". Tiu ideo celas la esperon, ke lingvo kapablas esprimi senperan rilaton, kvazaŭ interagon, inter homo kaj sankteco (124). Historia evidenta kontraŭpunkto al tio estas la celo de iu homaro sen klasoj kaj nacioj, same preta kaj kapabla al utopio de komuna "internacionala" lingvo.

En la libro ekestas diferenciga diskurso unuflanke pri *perfekta* lingvo, alirebla nur al malmultaj, kaj aliflanke pri *universale parolita* lingvo, kiu devas resti malperfekta (84). Estas iluzio, ke perfekteco povas funkcii man' en mano kun universaleco (200). Tiu paradigmo ŝanĝo okazis en la epoko de la racionalismo, kiel esprimiĝas en la klasika Enciklopedio (120), sur la bazo de sinkronaj kaj diakronaj rilatoj inter lingvo kaj penso.

Estas ekkoneble ke granda parto de la libro baziĝas sur prelegtekstoj pri semiotiko enkadre de la universitato de Bologna. Ĉe la enormaj konoj pri la Renesanco kompreniĝas la emo de Eco al baroka ornamado per interesaj detaloj. La libro havas unuflanke enciklopedian

aspekton (kio signifas, saman objekton pririgardi el diversaj vidpunktoj), aliaflanke mankas necesaj citaĵoj (au estas ne ekkoneblaj). Antaŭ ĉio mankas, rilate al la planlingvoj, la diskuto pri fonetiko kaj alfabetigo. Li rezignis ĝenerale kaj intence (18) pri gramatikaj kaj sintaksaj diskutoj. Pri tiaj temoj troviĝas detaloj, parte pli interesaj rilate al "universalaj" lingvoj, en aliaj prisciencaj faklibroj, el kiuj mi volas indiki por la germanlingvanoj jenajn:

- Frederick Bodmer "Die Spachen der Welt", Kiepenheuer und Witsch,
- Heiz F. Wendt "spachen", Fischer, 1961,
- Paulo Ronaj "Der Kampf gegen Babel", Ehrenwirth, 1969,
- Reinhard Haupenthal "Plansprachen", Wissensch. Buchges., 1976,
- Harald Haarmann "Die Sprachen Europas", Campus, 1993.

La ĉapitro pri planlingvo, kiel dirita la antaŭlasta, trovas evidente specifan intereson inter la praktikantoj de Esperantoj. Sed la bazaj pripensoj pri naturaj lingvoj kaj planlingvoj estas multe pli interesaj. Ĝenerala difino de natura lingvo diras, ke sonoj kombiniĝas al signifon portantaj sintagmoj (256); sonoj mem estas, senrilate al iu lingvosistemo, sensignifaj, sed kun rilato al iu lingvo ili estiĝas signifon portantaj fonemoj. La senco kaj kapableco de lingvo estas formi: el unuopaj signifantaj vortoj, pli au malpli kompleksajn gramatikajn frazojn kun la celo de lingva komunikado (117), krome de vida, auda, odora-flara komunikado. La vorto rolas kiel kopi-bildo, kies originalo estas la penso (319). Eco rezignas konscie pri serĉado al universala gramatiko (318), mencias tamen gramatikajn principojn, komunaj al ĉiuj lingvoj (85).

Al tiu temo ŝajnas aldonindaj kelkaj aktualaj esploradoj. Steven Pinker (USA - MIT), baziĝanta sur pripensoj de Noam Chomsky, supozas ennaskitan "universalan" gramatikon (kvazau gramatikan genon) en la formo de "mentala softvaro", kiu devas esti programita en la unuaj vivjaroj per iu parolita lingvo. Multaj neurobiologoj interkonsentas nuntempe pri ekzisto de gena komponanto por la fenomeno lingvo kaj estimas, ke la duono de niaj genoj estas uzitaj por la konoj de nia cerbo.

Tiun ideon alludas ankaŭ Eco menciante la diskursojn pri kelkaj universalaj lingvoj; el tio rezultas la postulato de iu proto- au eĉ pralingvo, reprezentebla en iu supoza genkodo (125). Ankaŭ popolumentikistoj kiel André Langaney (Ĝenevo) diskutas la paralelecon de la genealogiaj arboj de la popoloj kaj de la lingvofamilioj, el kiu "parolas" certa pralingvo, kies ekzisto jam Darwin supozis.

Eco diskutas praktikajn interlingvajn demandojn. Ĉiu IHL starigis la problemon de la lingva relativismo, lau kiu la diversaj lingvoj organizas la enhavon diference kaj reciproke malakordigebla (335). Tiurilate restas Esperanto kaj leksike kaj sintakse kunligata kun la indoeuropa modelo. Spite al favoraj proprecoj de Esperanto sekve rezultas, ke sciencaj kialoj por akiri ties mondvastan akcepton ne ekzistas: la kauzoj, ke naturaj lingvoj sukcesis, baziĝas sur eksterlingvaj kondiĉoj (336) (tio validas antaŭ ĉio por la angla-usona; sub similaj favoraj kondiĉoj Esperanto certe sukcesus). Aldoniĝos do, plej favore, al la ĝisnunaj naturaj lingvoj unu plia, konstruita lingvo, estiĝinte kvazau natura per vasta uzo.

Sub la kondiĉo, ke ekzistas tia aposteriora lingvo, estiĝas la unuaranga principo de la tradukebleco (349) kaj sekve la demando: kio signifas traduki.

Tiurilate Eco pretendas, ke estas principe ĉiam eble, traduki el unu lingvo en alian. Normale tio okazas nur en la kadro de unu natura lingvo en alian; sed la laborinvesto por iu ponto-lingvo estas la sama. En la kazo de IHL temas ne nur pri la klasifikado de iu definitiva amplekso de la scio, kiel en la 17-a jarcento ĉe la kreado de iu apriora lingvo, sed en nia kazo temas pri la disponebligo de la kompleta lingva ilaro por nia alt-teknikigita mondo.

Oni povas supozi, ke Eco jam tenis en manoj instrulibron por la muntado de fremdlanda automobilo kun miloj da tradukitaj fakesprimoj pri munteroj, pri la aldonaj muntiloj kaj la necesaj kontrolpriskriboj. Tiuj listoj estas la produkto de multaj t.n. viro-jaroj da traduklaboro kaj objekto de specifaj ekzercoj en la interpretistejoj. Por tiaj laboroj,

normiga (kaj normigita!) ponto-lingvo povus esti tre utila. Nur, ni audas pri la kompetenc-malkonsento en la EU-komisionoj pri faka detaloj (ekz. eĉ dulingve ne eblis interkonsento en EU pri universala europa elektro-kontaktstopilo!). Pro tio ni legas ĉe Eco kun malico la cititan sugeston de Dante (347), ke la konfuziĝo ĉe la "babela" konstruado eble baziĝis sur prolifera multobliĝo de la metiaj faklingvoj, baziĝantaj sur la labordivido ĉe la babela entrepreno: la lingva pelmelo evoluis el la neceso, nomi la diversajn ilojn; tion faris ĉiu metio-oficejo, lau la privilegio de Adamo, alimaniere (EU salutas!).

Lingvo kreas identecon en la metio; ĉiu komuna lingvo kreas interkonsenton en la popolo, kaj antaŭ ĉio en la nacio (110): "la ŝtato - tio estas la lingvo" (344).

Pro tio, plej grava kontraŭanto de IHL estas la egoismo de la registaroj, kiuj ankoraŭ neniam strebis al tio, kiu taugas por la homa asocio en ties tutaĵo (339), kaj kiuj ankoraŭ neniam efektive interkonsentis pri aferoj, kiuj havas komunan intereson por la tutaĵo de la homa asocio (345). La ŝtataj institucioj havas grandan intereson je la multlingveco kun la samtempa intenco al la hegemonio de la propra nacia lingvo.

Konsiderindaj estas ankaŭ pripensoj, kiuj supozas ŝanĝiĝon de la lingvo per simpla ĉiukontinenta uzado pro paralelaj evoluoj en specifajn dialektojn (336) (ankaŭ tio certa "babel"iĝo). Tio estus direktebla per respondeca uzado en la mondvastaj medioj, se ili funkcios kiel kontrolantoj de la lingva unueco. Grava, baza kondiĉo por universaleco de iu lingvo estos unueco (kaj simpleco) en skribo kaj ortografio. Necesas akademio, grava ne nur surbaze de ekzisto, sed de perfekta kompetenteco. Sed same gravas la t.n. "normala prudento" kiel permanenta kontrolo de la lingva komunikada proceso (295).

Oni ne trovas rimarkojn pri la esperanto-specifaj diakritaj signoj, ili eĉ mankas ĉe la prezentitaj ekzemploj (la eldona presejo ŝajnas ne disponi pri tiuj raraj karakteroj!). (La angla kontraŭe majstras sian malfacilan ortografion per 26 latinaj literoj sen iu supersigno, estiminda artaĵo!).

La naturaj lingvoj estas perfektaj (349); ĉar ili estas tiom multaj, ili respondas al multspecaj esprimmanieroj: la vereco estas multspeca. Pro tio ekzistas eldiro, ke maniero de mensogo konsistas el tio, prezenti verecon ununura kaj definitiva. Vereco funkcias ne-direbla, ĝi estas multtavola (200). Kio do signifas "interkonsenti" sub tia kondiĉo? Certe ne tio, la samon same, teknika konforme nomigi lau ties funkcio. El la jam menciita supozo, ke inter la multegaj naturaj lingvoj ekzistas certa "interkonsento", rezultas la ideo, ke iu pralingvo jam entenis ĉiujn lingvojn. La pli posta proceso de la alfabetigo de la lingvoj ekestis nur ĉe la komercantaj popoloj; ĝi estas pli alta stadio de la analiza nomigo, kiu reprezentas analogion inter la universalaj ekvivalentoj de la alfabetaj signoj kaj la universaleco de la mono (176).

Necesas ekkoni, ke Eco estas tro ampleksa spirito ol ke li prenas iun solvon kiel la definitivan. Pro tio ne helpas, alkrampi sin al lia persono kiel legitimilo de Esperanto; li estas intelektulo, kaj ne fundamentalisto. Semiotiko estas pli vasta koncepto ol lingvistiko. Ni memoru: ekzistas ĉirkau 6000 lingvoj, el kiuj 90% troviĝas en danĝero estingiĝi - por profunda esplorado restas nur malmulte da tempo. Por ni gravas, ke ĉiu lingvo staras kaj falas ("starfalas") kun la ordinara ĉiutaga uzado; vizioj kaj sorĉa vokado povas vivteni ĝin nur kiel dekoracio, kiel laulanda folkloro muzeaĵo, kiu havas la aspekton de enscenigo (cetere restas la pridisputenda skribo-maniero, malfacile mondvaste agnoskebla).

Sub la necesa adaptiĝo al rapida evoluo "universala" lingvo devas esti pliampleksebla, aperta sistemo, kiu devas esti kapabla esprimi ankoraŭ ne konataj faktoj kaj nocioj. Ekzistas danĝero, ke ebla apriora lingvo de artefarita inteligenteco povus sin oferti, sed tio ne estus humana solvo, kion elmontras ĝuste la studoj de Eco.

Ĝenerale, oni rajtas ne-estimi la barokan miksamason, la trodatumaron de la libro, sed en ĉiu kazo estas la atentema legado de la tuta teksto (ne nur de 9 paĝoj) plezura kaj tre instiga okupiĝo, kiu malfermas interesajn en- kaj elvidojn.